El la regularo de la Internacia Konfederacio de la muzikistoj, akceptita je la 3^a internacia kongreso de Milano dum 1906, ni elĉerpas:

« Ĉu ne ĉiuj rediros tuj la verbojn? (La verbo, esprimante la vivon, estas la animo de la lingvo!) Kaj poste la lernantoj mem kunmetos la frazojn.

Ni aldonas gravan rimarkon: la idearo restos en la kapo, dank' al ĝia logika forto, dank' al la tempa kunligo inter kaŭzo kaj sekvo.

Kiam la lernantoj konos la supran fundamentan lecionon, per ŝango de nur paro da vortoj ili egale flue parolos pri: trinki glason da biero, da vino, glaseton da likvoro; trinki tason da kafeo, teo, ĉokolado, aliaj trinkaĵoj.

Laŭ la Guina metodo, nur kiam la *spirito* rezonis, nur kiam la *oreloj* aŭskultis, kiam la *buŝo* jam parolis, tiam oni malfermas la lernolibron, por ke fine ankaŭ la *okuloj* helpu por fiksi la idearon en la kapo.

Kiam natura estas tia laboro! Ĉu ne tiamaniere la infano lernas sian nacian lingvon?

Ne per solaj vortoj, nur per frazoj, per ideoj!

Plie, legante, ĉar la lernanto jam antaŭe bone diris *glaso*, *prenas*, *buŝo* kaj aliajn malfacilajn vortojn, li trovas de si mem la elparolajn regulojn. Tiel trovita regulo estas neforgesebla.

Sama rimarko rilatas al la gramatiko: ĝi estas plej praktike instruata. Nur per supra ekzerco ni iam bone montros, ekzemple, la objektan literon *n*, — la inversion: sur la tablo staras... glason mi prenas... — ni faros demandon: ĉu la glasostaras?... ĉu vi prenas? — ni aldonos adjektivon: granda glaso da pura akvo... — ni uzos alian personon, tempon, k. t. p.

Ju pli da lecionoj estas farotaj, laŭ la Guina metodo, des pli facile kaj rapide la laboro progresas. Post kelkaj lecionoj, ĉiu kursano lerte dismetas kaj klarigas en Esperanto, kion li faras por lavi kaj vesti sin, por skribi leteron, forsendi komercaĵojn, vojaĝi, ludi, unuvorte, li esprimas siajn agojn, sian vivon.

Tiam oni povas frukte uzi la senpezan metodon por interparoli, ĉar la lernantoj jam posedas la unuajn materialojn de la lingvo. Ili eble parolos poste pri scienco, filozofio, k. t. p.

Sed ni ne forgesu, ke tiu kiu povas esprimi en la lernota lingvo ĉion kion li faras kaj vidas fari de l' mateno ĝis la vespero, sufiĉe bone konas la lingvon por progresi rapide per sia propra forto. De la *praktika* Esperanto, kiel de ia ajn nacia lingvo, la vivplena kerno kuŝas en

LA ĈIUTAGA VIVO!

FRANS SWAGERS.

« ART. 12. — La lingvo uzata por la federaciaj korespondoj estas la lingvo de la ricevonta lando, krom apartaj konsentoj aŭ materiaj malhelpoj; en tiu okazo, la lingvo Esperanto fariĝos la *oficiala lingvo* por la skribitaj sciigoj. »

La ĝenerala kunveno de la Asocio de la Akademioj, kiu ekzamenos la demando pri akcepto de internacia lingvo, okazos en Londono je la 29^a de majo.

Leŭtenanto Bayol kaj sinjorino Bayol faris esperantistan vojaĝon tra Francfort, Leipzig, Dresde, Reichenberg, Prague, Nuremberg kaj Stuttgart.

En ĉiuj urboj, la samideanoj faris bonan akcepton al la vojaĝantoj; siavice leŭtenanto Bayol paroladis pri Esperanto kaj Ruĝa Kruco.

La urbestro de Douvres donacis premiojn por la kvar plej bonaj lernantoj de la Esperanta kurso. Laŭdinda ekzemplo, kiu eble disvastiĝos, almenaŭ ni esperu tion.

Ni deziras bonvenon al nova ĵurnalo sud-amerika, la Brazila Revuo Esperantista, kiu intencas eliri ĉiumonate. La revuo estas bele prezentita, en lingvoj portugala kaj Esperanto. La adreso de la redakcio estas: Rua da Assembléa, 46, Rio de Janeiro. Vidu ankaŭ la nomaron de la ĵurnaloj sur nia koverto.

La ĵurnalo « Germana Esperantisto » raportas detale pri demando farita al la grupo en Düsseldorf, de la ĝendarma leŭtenanto Jacques, el Laeken, kiu deziris ricevi oficialan certigon. Tio sukcesis, dank' al Esperanto.

La Esperantistoj, kiuj intencas prezenti proponojn pri temoj ekzamenotaj en la 3^a Kongreso, bonvolu sendi ilin al la prezidanto de la konstanta komitato de Kongresoj, 51, rue de Clichy, Paris.

Monkolekto estas organizata por helpi keikajn blindulojn kiu kunvenos en la Kongreso de Kembriĝ. Oni povas sendi la donacan monon al la Direktoro de la ĵurnalo « Esperanta Ligilo » en Paris.

Ni memorigas al niaj legantoj ke la bileto por la Tria Kongreso kostas 10 frankojn. Oni rogas la partoprenantojn ke ili sendu ilian aliĝon kaj sciigon pri ilia alveno al la adreso: Kongreso, 2, Kings Parade, Cambridge.

Ni legis, en kelkaj ĵurnaloj, sciigojn pri la kosto de dormoĉambro kaj manĝoj dum la proksima kongreso sed ni ne povas certigi ilin: ekzemple, biletaro estas aĉetebla por dormoĉambro dum sep tagoj, por tagmanĝoj kaj vespermanĝoj dum nur kvin tagoj... sed oni ne montras kiel la kongresanoj sin nutros dum la aliaj tagoj.

Ni rekomendas, al niaj samlandanoj, legon de la ĵus aperintaj afiŝoj pri speciala rabato por la biletoj de transmara veturo dum la aŭgusta monato. Tiuj biletoj estas akireblaj por la vojaĝo Ostende-Dover aŭ Anvers-Harwich, ili valoros dum ok tagoj.

MOZANO.

KRONIKO DE LA GRUPOJ.

Bruxelles. — Le groupe des Aveugles de Woluwe, vient d'éditer une série de cartes postales illustrées au sujet de l'Institut de Woluwe. Une de ces cartes nous montre le comité du groupe entourant une vaste mappemonde, les autres représentent la société d'harmonie, les divers métiers enseignés aux aveugles, etc.

On peut se procurer ces cartes à l'Institut même, 72, Avenue Georges-Henri à Bruxelles; le coût en est d'un franc la douzaine.

Arlon. — Le journal « Echo du Luxembourg » nous apprend que le cours de M^{lle} E. Lecointe a commencé le 6 mai dans la grande salle de l'Hôtel-de-Ville et a lieu le lundi et le mercredi dans le même local.

Liège. — Le lundi 6 mai, M^r le lieutenant-colonel de Troyer, président du groupe espérantiste de Liège, a présenté les principaux éléments de l'Espéranto, dans une réunion organisée à l'Université. Après la conférence, M^r de Troyer fit la traduction de textes divers et d'articles de « La Belga Sonorilo » avec la seule aide du dictionnaire et du résumé de la grammaire que l'on pouvait se procurer à la réunion.

Bruges. — Le 27 avril, a eu lieu au local du groupe espérantiste brugeois la fête annuelle du groupe. De gracieuses jeunes filles chantèrent diverses romances et récoltèrent des applaudissements enthousiastes; à la fin de la fête, le lieutenant Van Weyenbergh, secrétaire, au nom de tous les assistants, fit cadeau d'un beau souvenir à M^r A.-J. Witteryck, le sympathique président, dont le dévouement est une garantie de succès.

Bruxelles. — La Woluwa Blindulgrupo Esperantista eldonas serion da poŝtkartoj ilustritaj pri la Instituto de Woluwe. Unu el tiuj kartoj montras al ni la komitaton de l' grupo ĉirkaŭantan vastan terglobon, la aliaj reprezentas la harmoni-societon, la diversajn metiojn instruitajn al la blinduloj, k. c.

Tiuj kartoj estas aĉeteblaj ĉe la Instituto, 72, Avenue Georges-Henri, Bruxelles; dekduo kartoj kostas unu frankon.

Arlon. — La ĵurnalo « Echo du Luxembourg » sciigas al ni ke la kurso de M^{lle} E. Lecointe komencis de la 6^a de Majo en granda salono de la Urbadomo, kaj okazos ĉiulunde kaj ĉiumerkrede en sama loko.

Liège. — Je la lundo 6^a de Majo, S^{ro} leŭtenanto-kolonelo de Troyer, prezidanto de la Lieĝa Grupo Esperantista, prezentis la ĉefajn elementojn de Esperanto en kunveno organizita ĉe la Universitato. Post la parolado, S^{ro} de Troyer tradukis diversajn tekstojn kaj artikolojn el « La Belga Sonorilo » nur kun helpo de la vortaro kaj de resumita gramatiko aĉeteblaj dum tiu kunveno.

Bruges. — Je la 27^a Aprilo, okazis en loko de la Bruĝa Grupo Esperantista, la jara festo de l' grupo. Graciaj fraŭlinoj kantis diversajn romancojn, kaj rikoltis entuziasmajn aplaŭdojn; je la fino de la festo, leŭtenanto Van Weyenbergh, sekretario, je la nomo de ĉiuj alestantoj, prezentis belan donacon al S^{ro} A.-J. Witteryck, la simpatia prezidanto, de kiu la sindoneco estas garantio de sukceso.

Laeken. — Le 26 avril, a eu lieu au groupe « La Semanto » la soirée de fermeture du second cours organisé par le groupe.

De nombreux membres du groupe « Pioniro » y assistèrent et apportèrent à la fête une animation sympathique. Le programme comprenait de la musique, du chant et de la déclamation; seuls les élèves du cours exécutèrent ce programme et recueillirent des applaudissements unanimes.

Entre la première et la seconde partie de la fête, M. Bero, élève du second cours, au nom de tous les élèves, remercia cordialement le professeur M. Luc. Blanche; en même temps une fillette, M^{lle} Vallez, lui présenta un superbe cadeau, en souvenir des réunions du cours.

M. Saucin, secrétaire de l'Université Populaire jeta un coup d'œil sur les résultats acquis grâce à l'activité du groupe, et le président M. Calais donna lecture d'une lettre du Com^t Ch. Lemaire, qui, excusant son absence, se joignait de tout cœur à la manifestation en l'honneur de M. Blanche. Le président attire encore l'attention sur l'importance du mouvement actuel et fit entrevoir les heureux résultats que nous avons l'espoir de recevoir de l'adoption d'une langue seconde, la même pour tous.

A son tour, M. Luc. Blanche remercia les organisateurs de cette fête fraternelle, félicita les élèves sur leur assiduité et souhaita une ample moisson pour le grain semé.

La fête se termina fort tard, au milieu d'un joyeux enthousiasme.

Antverpena Grupo Esperantista. — De werkzame Antwerpsche groep heeft op Zaterdag 4^{en} Mei, tot sluiting harer winterwerkzaamheden, aan hare leden een muzikaal en letterkundig avondfeest aangeboden.

Een uitgelezen publiek bezett'e de prachtige en ruime feestzaal der « Taverne Royale »; vooral waren vele esperantische dames bij het feest aanwezig, een bewijs, dat het Esperanto hoog geschat wordt door het schoone geslacht.

Nevens den voorzitter der groep bemerkte men de Brusselsche vrienden J. Jamin en L. Blanche, de voorzitters der Berchemsche groep en van *la Verda Stelo* (Zurenborg) en het Antwerpsch komiteit. D^r Raym. Van Melckebeke wenschte de aanwezigen welkom en dankte van harte de verkleefde dames en Juffvrouwen, die hun welwillende medehulp tot het welgelukken van het feest verleenden.

Weldra streefde het lied « *Flugantaj revoj* » (P. Wachs) ons gehoor; het stuk werd gebisseerd, een klaar bewijs van de volmaaktheid, waarmede de bevallige Mevr. Jacobs het had gezongen.

Het geestig stuk « *Estas la kato...* » zeer levendig gedeclameerd door Jufvr. C. Giffroid, heeft iedereen veel genoegen gedaan.

Mevr. Jansen, wier talent de leden der groep reeds meermalen toegejuicht hebben, behaalde grooten bijval met de melodie « *Strofoj* » (Flégier) en de zoetluidende romance « *Lulila kanteto* » (Keurvels).

Even zeer toegejuicht waren het « *Ho, mia kor'...* » (J. Guivy) en het gedicht « *La Donaco* » (R. Loveling) door de talentvolle Jufvr. J. Matrige.

De heer Horowitch deelde het onderhoud mede,

Laeken. — La 26^a de Aprilo, okazis ĉe la grupo « La Semanto » la vesperkunveno pri la finiĝo de la dua kurso organizita de la grupo.

Multaj samideanoj de l' grupo « Pioniro » ĉeestis kaj alportis simpatian viglecon al la festo. La programo enhavis muzikaĵojn, kantojn kaj deklamojn; nur la lernantoj de la kurso plenumis tiun programon kaj rikoltis unuanimajn aplaŭdojn.

Inter la unua kaj dua parto de la festo, S^{ro} Bero, lernanto de la dua kurso, je la nomo de ĉiuj gelernantoj, kore dankis la profesoron S^{ron} Luc. Blanche; samtempe fraŭlino Vallez prezentis al li belegan donacon, memoraĵon de la kursaj kunvenoj.

S^{ro} Saucin, sekretario de la Popola Universitato esploris la rezultatoj akiritaj dank' al la agemo de l' grupo, kaj la prezidanto S^{ro} Calais legis leteron de K^{to} Ch. Lemaire kiu, senkulpigante sian foreston, partoprenis tutkore al la simpatia manifesto je la honoro de S^{ro} Blanche. La prezidanto montris ankoraŭ la gravecon de la nuna movo kaj antaŭvidis la feliĉajn rezultatojn, kiuj ni espereble ricevos post alpreno de dua lingvo, la sama por ĉiuj.

Siavice, S^{ro} Luc. Blanche dankis la organizantojn de tiu frata festo, gratulis la lernantojn pri ilia diligenteco kaj deziris fruktodonan rikolton por la semita grajno.

La festo finiĝis tre malfrue, meze la plej ĝoja entuziasmo.

Antverpena Grupo Esperantista. — La agema Antverpena grupo finigis la vintran sezonon, invitinte siajn membrojn al muzika vesperkunveno kiu okazis je 4^a de majo. Eleganta publiko plenigis la luksan vastan salonon de la « Taverne Royale »; precipe multnombraj esperantistinoj ĉeestis tiun feston, pruvante ke Esperanto estas alte ŝatata ankaŭ de la ĉarma sekso.

Je l' flankoj de la Prezidanto de Grupo ni rimarkis la Bruselajn samideanojn J. Jamin kaj L. Blanche, la Prezidantojn de la Berchem'a grupo kaj de la *Verda Stelo* (Zurenborg) kaj la Antverpenan komitaton. — D^{ro} Raym. Van Melckebeke deziras la bonvenon al la ĉeestantoj kaj tutkore dankas la sindonemajn sinjorinojn kaj fraŭlinojn kiuj tiel bonvole kunhelpas je l' sukceso de la festo.

Baldaŭ la kanto « *Flugintaj revoj* » (P. Wachs) ĉarmis niajn orelojn; la dufoja, de ĉiuj petata, kantado sufiĉe pravas kiel perfekte la ĝentila S^{rina} J. Jacobs kantis tiun romancon.

« *Estas la kato...* » tre sprita kaj lerta deklamaĵo de F^{ino} C. Giffroid ĉiujn amuzis.

Sinjorino L. Jansen kies talenton la grupanoj jam alifoje aplaŭdis ĉarmis nin per la melodio « *Strofoj* » (Flégier) kaj la dolĉa romanco « *Lulila kanteto* » (Keurvels).

Ne malpli belaj nek malpli aplaŭdataj estis la « *Ho, mia kor'...* » (J. Guivy) kaj la poezio « *La Donaco* » (R. Loveling) de talenta Fraŭlino J. Matrige.

Sinjoro Horowitch rakontas sian intervidiĝon

dat hij gedurende zijn laatste reis met Dr Zamenhof had gehad.

Aan « *Kanto de Printempo* » en « *Nokta Kvieto* » (Gohr), prachtige duetten gezongen door Mevrouw V. Claessens en Jufvr. S. Vernay, vielen herhaalde en verdiende toejuichingen ten deel. Hetzelfde gebeurde met « *Serenado* » (Lassen) door Mevrouw J. Jacobs gezongen, en het verheven gedicht « *Preĝa Alvoko* » (L. Zamenhof) door Jufvr. Giffroid gedeclameerd.

Daarop deed de heer L. Blanjean een warme en krachtige aanspraak, waarin hij het overgroot genoegen meldde dat hij telkenmale voelt, wanneer hij een feest der wakkere Antwerpsche groep bijwoont.

Wat zeggen over het laatste nummer van dit zoo geslaagd programma: « *La Espero* »? Het was een algemeene geestdrift wanneer het dameskwartet deze levendige hymne zong, waarvan de laatste stoffe door al de aanwezigen in koor werd herhaald. Luidruchtig werd de heer O. Van Schoor, komponist van dit schoone stuk, opgevorderd, die door deze sympathische betooging zichtbaar ontroerd was.

Vergeeten wij niet bijzonder den talentvollen en verkleefden Dr W. Van der Biest te vermelden, die de muziekstukken begeleid heeft en aan wien men grootendeels het welgelukken van het feest schuldig is.

Om 11 uren verlieten de leden hoogst vergenoegd de feestzaal met het voornemen a. s. jaar met nieuwen ijver tot de A. G. E. terug te keeren.

Voegen wij hier bij dat over dit schoone feest uitvoerig verslag werd gegeven door de Antwerpsche nieuwsbladen « *La Métropole* » en « *La Presse* ».

Berchem'a Grupo Esperantista. — Buitengewone zitting, op woensdag 24ⁿ der verleden maand, in deze jonge, doch geestdriftig bloeiende vereeniging! Tal van heeren en dames uit Antwerpen, waaronder de beste Esperantisten, waren naar Berchem gekomen om hunne medebroeders door woord en daad aan te moedigen, en de Berchemsche Esperantisten wisten hunne bezoekers goed te vergasten, om niet te zeggen te verrassen. Na een korte les door Dr Broeckaert, gaf de schrijver, Prof. Van Laere, een zeer gelukt esperantisch verslag over de laatste verbroedering met de Verda Stelo te Zurenborg, opvolgentlijk kregen we gansch origineele verhandelingen, gedichten en vertelsels door de leden van de groep te hooren: *La ora tabakujo*, *Sonĝo*, *La pasisto*, *Mia kara pipo*, enz. Luidruchtiger werd het in de zaal van het « *Café des Arts* » toen de vriend Van der Straeten het muzikaal gedeelte aanving door een krachtig aanheffen van het « *Himno* » van Zamenhof, dat in koor werd herhaald. En dan, ho! dan was het 't eene esperantolied na het andere! Gastblestro Swagers dischte ons zijn leutige gezangen op: *Trinkkanto*, *Krambamboliaĵo*, *Ĉiusabate* enz., en 't dreunde, en men lachte, en 't was dan ook zoo intiem broederlijk tusschen al die samideanoj, dat men hadde gewenscht zoo maar uren lang nog te mogen verbroederen. Het was ook reeds « morgaŭa tago » toen voorzitter Prof. Haevermans het « ĝis la revido » uitriep, en eenieder, verrukt over zoo'n genoeglijken avondstond, huiswaarts keerde.

kun Doktoro Zamenhof dum sia lasta vojaĝo.

« *Kanto de printempo* » kaj « *Nokta kvieto* » (Gohr) belegaj duetoj kantitaj de Sinjorino V. Claessens kaj Fraŭlino S. Vernay ricevis merititajn ripetitajn aplaŭdojn. Same okazis pri *Serenado* (Lassen) de Sinjorino J. Jacobs kaj pri la belega poezio « *Preĝa alvoko* » (L. Zamenhof) de Fraŭlino Giffroid.

Poste Sinjoro Blanjean aldonis kelkajn varmajn, energiajn parolojn dirante kiom li estas feliĉa ĉiufoje kiam li ĉeestas feston de la agema Antverpena Grupo.

Kion diri pri la lasta numero de ĉi tiu sukcesinta programo « *La Espero* »? Estis ĝenerala entuziasmo kiam la kantantaj Sinjorinoj finigas tiun vivoplenan himnon per rekantado de la unua strofo kiun ĉiuj ĉeestantoj ripetas. Bruege ili petas la aŭtoron de tiu bela muzikverko; kaj oni kondukas sur la scenejon Sinjoron O. Van Schoor, la Vicprezidanton, kiu salutante estas videble kortuŝata pri tiu simpatia elmontrito.

Nine forgesu citi speciale la talentan kaj fervoran Doktoron W. Van der Biest, kiu akompanis la muzikaĵojn kaj al kiu estas grandparte ŝuldata la sukceson de la festo.

Je la 11^a h. ĉiuj samideanoj kontentaj pri tiu agrabla kunveno forlasas la salonon promesante ke la proksiman jaron ili revenos kun nova fervoro al la Antverpena Grupo Esperantista.

Ni aldonu ke pri tiu bela festo la Antverpenaj gazetoj « *La Métropole* » kaj « *La Presse* » publikigis detalajn raportojn.

Berchem'a Grupo Esperantista. — Merkredo je 24^a de Aprilo, speciala kunveno okazis en tiu entuziasma floranta societo. Multaj sinjoroj kaj sinjorinoj el Antverpeno, inter kiuj spertaj Esperantistoj, venis en Berchem por kuraĝigi per parolo kaj faro siajn kunfratojn; kaj la Berchem'aj Esperantistoj akceptis bonege, eĉ surprizis, siajn gastojn.

Post mallonga leciono instruita de Dr^o Broeckaert, Sr^o Sekretario Van Laere legis interesan raporton pri la fratigo kun *La Verda Stelo* en Zurenborg. Poste oni aŭskultis serion da originalaj verkoj, poezioj kaj rakontoj de la grupanoj: *La ora tabakujo*, *Sonĝo*, *La pasisto*, *Mia kara pipo*, k. t. p. — Fariĝis brue en la salono de la *Café des Arts*, kiam amiko Van der Straeten komencis muzikan parton per ekkanto de « *Himno* » de Zamenhof, kaj poste unu Esperanta kanto sekvis alian. Gasttablestro Swagers ekkantis siajn petolaĵojn: *Trinkkanto*, *Krambamboliaĵo*, *Ĉiu sabate* kaj estis bruado, ridado, intima frateco inter ĉiuj samideanoj: volonte oni estus fratiganta tiamaniere dum horoj... Estis ja morgaŭa tago kiam Prezidanto Haevermans ekkriis la « Ĝis la revido » kaj kiam ĉiuj post tiel agrabla vespero hejmen reiris.

Bravo Berchem, en een driedubbele ban: Ĉiu! Ĉie! Ĉiam! Ĉu!!!..

La Verda Stelo. — Deze jonge groep, eerst vóór drie maanden gesticht, telt reeds 90 leden. Haar leergang bij eene der gemeentescholen der stad ingericht wordt druk bezocht en de grupanoj, die altijd en overal de groene ster als herkenningsteeken dragen, onderscheiden zich door hun doelmatige en onvermoeide propaganda. In het lokaal der maatschappij ligt de « *Belga Sonorilo* » op de leestafel.

De handelingen van « *La Verda Stelo* » trekken algemeen de aandacht van het publiek in het bevallige en volkrijke Oostkwartier der stad.

Brave, Berchem! triobla aplaŭdo: Ĉiu, Ĉie, Ĉiam, Ĉu!!!..

La Verda Stelo. — Tiu juna grupo, nur fondita de tri monatoj, enhavas jam 90 membrojn. Ĝia kurso, organizita en unu el la urbaj lernejoj, estas fervore vizitata kaj la grupanoj, kiuj ĉiam kaj ĉie surmetas la verdan stelon kiel rekonosigno, distingas sin per sia laŭcela kaj nelacebla propagando. En la sidejo de la societo « *La Belga Sonorilo* » kuŝas sur la legtablo.

La agadoj de la « *Verda Stelo* » altiras ĝenerale la atenton de la publiko en la multhoma kaj ĉarma orienta kvartalo de la urbo.

BIBLIOGRAFIO.

Vocabulaire Français-Esperanto technologique des termes les plus employés en photographie et dans ses rapports avec la chimie, la physique et la mécanique par Ch. Verax, 1907, Paris, Charles Mendel, éditeur. 41 paĝoj. Prix: 0,75 fr.

La apero de teknika vortaro atestas ĉiufoje grandan progreson de la Esperanta movado, ĉar, kiam la lingvo interesas sufiĉe da samprofesianoj por ke ili bezonu teknikan vortaron, tiam fakte pruviĝas utilo de internacia lingvo. — La verko de Sr^o Ch. Verax estas zorge prilaborita. En scienco kiel kemio la kreo de teknikaj alikoj estas nepre necesa kaj nia persona opinio estas ke la aŭtoro bone elektis ilin. Laŭ proponoj jam faritaj de konataj esperantistoj en *Sciencia Revuo* (1904 p. 22 kaj 93) li simpligis kelkajn radikojn jam presitajn en « *Fundamento* » interalie *sulfo* kaj *fosfo* por ebligi pli regulan kaj pli internacian formadon de vortoj: *sulfato*, *fosfato* k. t. p.; same por *arseno* anstataŭ *arseniko*, sed ĉi tie la ŝanĝo estas malpli grava ĉar oni povos konservi la vorton *arseniko* por la arsenoza oksido nomata en franca lingvo « *arsenie* ».

Utile la aŭtoro povus ankaŭ reguligi kaj simpligi *klorhidrikacido* n. k. a. uzante *klorhidracido*: la kemia sufiĉo *ik* estas senutila ĉi tie ĉar ne ekzistas *hidrozacido*.

Krom la novaj radikoj, ĝenerale bone elektitaj, multaj vortoj plaĉas pro sia lerta kunmetiĝo.

Kompreneble neniu postulos ke tia nomaro estu perfekta. Ĝis kiam la Internacia Sciencia Oficejo kaj la Lingva komitato estos kolektintaj kaj diskutintaj la ekzistantajn nomarojn, ĝi restos nur provo, sed provo plej interesa kaj verko pri kiu la sperta aŭtoro meritas gratulojn.

D^r REM.

Enketo pri Enketo-Konkurso.

Niaj legantoj scias ke « *Tra la Mondo* » malfermis grand-sukcese internacian enketon pri edukado. La intereso de l'raporto, nune publikigata, montras kiom Esperanto taŭgas por tiaj esploroj.

Sekve nia ŝatinda kunfrato intencas malfermi baldaŭ novan enketon. Por ke tiu ĉi utilu, kiel eble plej frue al la esperantistoj, tiuj ĉi estas petataj konigi mem la temon, kiu ŝajnas al ili pleje esplorinda.

Pri tio, estas malfermita prepara enketo, sekvota de aljuĝo de premioj, al kiuj ni altiras la atenton de niaj legantoj. La demando de l'konkurso estas en la 10^a n^o (75 e. ĉe *Tra la Mondo*, Meudon, S. & O., France).

TRIA KONGRESO.

Al Pastroj.

La Sekretario de la katolika Komitato dum la « *Cambridge* » Kongreso, rogas siajn kunfratojn, pastrojn, komuniki kun li pri loĝejoj, konvenaj, malkaraj kaj proksimaj de la Preĝejo Katolika.

La Parokestro, Mgr. Scott, ŝatus scii la nombron proksimuman, da Pastroj katolikaj apudestontaj la kongreson.

Sin turni al

M. l'Abbé Richardson,
Institut St Louis,

Bruxelles.

Pri loĝejoj, la Abato Richardson povas ankaŭ doni kelkajn adresojn al aliaj kongresontoj ne pastroj.

Belga Ligo Esperantista.

Ni jam anoncis ke, por apogi la klopodojn de la komitato de la Ligo apud la regantaro, kaj laŭ speciala rekomendo, la komitato decidis rogi de la meembroj provajn dokumentojn, kiuj montros la nunan disvastigon de la lingvo en Belgando. La klopodoj celas precipe enkondukon de la lingvo en la oficialaj programoj pri lernado.

Ni ricevis la unuan centon de tiuj folioj; ĝi apartigas tiele:

el Grivegnée-lez-Liége	2
el Namur	19
el Bruxelles (kaj ĉirkaŭaĵo t. e. Ixelles, St Gilles, Laeken, k. c.)	79

Sume 100

Ni esperas ke baldaŭ ni ricevos la resendon de la folioj, kiujn la ligaj grupoj ricevis; ĉiu esperantisto devus doni provon.

Poŝta Kesteto.

Sr^o G. Tétaud, instituteur, rue des Bons-Enfants, à Cholet (Maine-et-Loire, France), instruisto, deziras korespondi per Esperanto kun ĝeinstruistoj nefrancaj. — Skribu al li.



FUNDAMENTA REGULARO.

ART. 1^a. — Grupo fondiĝis en Bruselo havante kiel celon, la disvastigadon de la helpa internacia lingvo Esperanto.

Ĝi alprenis kiel titolon, la nomon « *Pioniro* ».

ART. 2^a. — La ĉefaj rimedoj por la agado de la societo estas speciale la jenaj:

1^e Organizado de kursoj, paroladoj, festoj, kunvenoj, ekskursoj,

2^e Starigado kaj ampleksigado de biblioteko,

3^e Aliĝo al la Belga Ligo Esperantista,

4^e Havigi al siaj partoprenantaj membroj, kiel eble plej malkare, ĉiuspecajn esperantajn presajojn.

ART. 3^a. — La grupo konsistas el efektivaj, protektantaj kaj honoraj membroj. Ĉiu persono enskribita antaŭ la 1^a de Marto 1907 estos proklamita « *membro fondinto* ».

ART. 4^a. — Por fariĝi membro de la grupo, oni devas plenumi la sekvantajn kondiĉojn:

1^e Akcepti tiun ĉi regularon,

2^e Pagi jaran kotizajon po 4 frankoj. Se kelkaj el la grupanoj estas samfamilianaj kunloĝantoj, la kotizajo por la unua estos nur 4 frankoj, la ceteraj kunloĝantoj pagos po unu, 1 frankon.

ART. 5^a. — La nomo « protektanta membro » estas donata al ĉiu efektiva grupano, kiu pagas jaran kotizajon po 10 fr. minimume.

ART. 6^a. — La nomo « honora membro » estas donata de la ĝenerala kunsido, laŭ propono farita de la komitato, al ĉiu persono farinta gravan servon por la afero esperanta.

ART. 7^a. — La societa jaro komenciĝas de la 1^a de Marto. La personoj enskribitaj post la 1^a de Septembro pagos nur duonan kotizajon por la kuranta jaro.

ART. 8^a. — La grupo estas administrata de komitato konsistanta el dekdu grupanoj elektitaj de la ĝenerala kunveno. Tiu ĉi elektas, plie, kvar anstataŭantajn membrojn, kiuj estas je la dispono de la komitato, por la okazo de eventuala plenigo de la konsilantaro. La komitato elektas inter siaj membroj:

- 1 prezidanton,
- 2 vicprezidantojn,
- 1 sekretarion,
- 1 helpantan sekretarion,
- 1 kasiston,
- 1 bibliotekiston.

ART. 9^a. — La komitato renoviĝas po unu duono ĉiujare. La vico de elirontaj membroj de la unua seria eligo, estas montrata laŭlote.

La elirantaj membroj estas reelekteblaj.

ART. 10^a. — La komitato kunvenas tiel ofte, kiel estas necese por la utilo de la grupo, kaj almenaŭ je unufojo ĉiumonate. La anstataŭantaj membroj ĉeestas la kunvenojn, kaj rajtas partopreni la diskutadon.

ART. 11^a. — La komitato povas rajte decidi nur se la plejmulto de la efektivaj membroj ĉeestas. Oni decidas nur laŭ la plejmulto de la voĉdonoj esprimataj. Kiam la dispartigo de la voĉdonoj estas egala, la voĉdono de la prezidanto estas plileĝdona.

ART. 12^a. — Ĉiujare okazas ĝenerala kunsido en la monato Marto. Oni raportas tie, pri la ĝenerala stato de la grupo; oni diskutas pri la aprobo de la societa bilanco kaj proponita budĝeto. Ankaŭ oni renovigas parte la komitaton.

ART. 13^a. — La komitato kunvokas eksterordinarajn ĝeneralajn kunvenojn, ĉu laŭ sia propra iniciato, ĉu laŭ peto subskribita de dudek grupanoj minimume.

ART. 14^a. — La kunvokoj pri ĝenerala kunveno estas sendotaj dek tagojn almenaŭ antaŭ la difinita dato de la kunveno; ili enhavos la diskutotan tagordon. Oni povos nur decidi kaj priparoli pri aferoj rilataj al la tagordo.

ART. 15^a. — La ĝenerala kunveno povas rajte konsiliĝi nur kiam la triono minimume de la efektivaj membroj estas ĉeestantaj. Se ĉi tiu kondiĉo ne estas plenumita, la kunsido finiĝas, kaj ree oni kunvokos novan kunsidon je dato kiu ne povos esti prokrastita de la antaŭa malpli ol tridek tagojn.

La nova kunveno rajtas konsiliĝi, kiom ajn estas la nombro de la ĉeestantaj membroj.

ART. 16^a. — Decido de la ĝenerala kunveno estas nur plenrajta post kiam ĝi ricevas la duonon de la voĉdonoj esprimataj.

ART. 17^a. — Specialaj sekcioj povas fondiĝi en la grupo post aprobo de la komitato. Ĉi tiu povos ĉiutempe nuligi sian aprobon kiam komuna bono ĝin postulos.

ART. 18^a. — Regularo pri internaj aferoj estas ellaborota de la komitato kaj prezentota al aprobo de la ĝenerala kunveno.

ART. 19^a. — La daŭro de la grupo estas senlima. En okazo de finiĝo, ĝia havo estos donacata al la kaso por propagando de la Belga Ligo Esperantista aŭ al ia simila esperantista grupo.

ART. 20^a. — Oni povos nur fari ŝanĝojn en ĉi tiu regularo, se ili estos akceptataj en ĝenerala kunveno, kaj almenaŭ aprobitaj de la du trionoj de la voĉdonoj esprimataj.

Akceptite kaj aprobite en Bruselo, la 24^{an} de Februaro 1907.

La Sekretario,
O. CHALON.

La Prezidanto,
L. BLANJEAN.